

## Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 7 FF. Abono por 1988 kun adresaro : 35 FF

P&ek: 3371 74 M BORDEAUX, Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque

\*\*\*\*\*

## ĜISMEDOLAJ ESPERANTISTOJ

LANTI inventis la vorton : ĝismedola, kaj ĝin aplikis al si mem. Alia estis mia kara amiko Raymond SCHWARTZ.

Tiu ĉi, pro la hazardo de geografio kaj historio, naskiĝis germano, kiam Loreno estis aneksita kiel "imperia tero" en la germana imperio. Li fariĝis franco post la unua mondmilito. Lerte uzante la du lingvojn, knedita de la du kulturoj, li funde asimilis la lingvon internacian, fariĝis unu el ĝiaj plej talentaj uzantoj, kaj akiris tute apartan lokon en ĝia literaturo. Lia verkista talento evidentiĝis en lia granda romano "Kiel akvo de l'rivero", kiu egalvaloras multajn grandkvante eldonitajn nacilingvajjn librojn; sed lia ĉefa originaleco sidas en la verkaro "sub la signo de gaja muzo" : "Verdkata Testamento", "La Stranga Butiko", "La Ĝoja Podio", "Kun siaspeca spico", artikoloj en diversaj gazetoj kaj en "la Pirato" de li fondita kaj gvidita. En tiuj verkoj, ĵonglante kun la vortoj, kreante multegon da vortludoj kaj trafaj esprimoj, li senpene elstaris kiel la esperanta humoristo.

LANTI, naskita en Normandio kaj edukita en la franca lingvo, kiun li tamen ne tre lerte uzadis, estis jam plenkreska, kiam li eklernis esperanton; sed, movata de profunda homarana sento, li tiel fervore adoptis la lingvon internacian, ke baldaŭ li akiris veran majstrecon en tiu lingvo; esperanto fariĝis lia plej intima kaj facila esprimilo, kaj li fariĝis unu el niaj

plej ŝatataj verkistoj.

Ĉe unu kiel ĉe la alia, la parolo fluis kiel el natura fonto: vigla kaj ridete trankvila ĉe SCHWARTZ, impeta, rapida, malpacienca, iafoje kun morda ironio ĉe LANTI. Ĉiuj, kiuj aŭdis ilin, scias, kion signifas ĝismedola esperantisto.

En mia longa esperantista vivo mi renkontis kelkajn aliajn, kiuj simile posedis lertan kaj elokventan parolfluon: Teofilo CART, Edmond PRIVAT, Andreo ĈE, se nomi nur forpasintojn, kaj inter la vivantaj Ivo LAPENNA. Inter ili SCHWARTZ kaj LANTI restas por mi kvazaŭ prototipoj. La multfaceta sprito de SCHWARTZ disradiis mil sparkobrilojn, la fulma sago de LANTI rekte flugis kaj celtrafe frapis. Iliaj voĉoj ankoraŭ sonas en mia memoro. Tiuj, kiuj ne aŭdis ilin per propraj oreloj, povas malfacile imagi la perkutan efikon de iliaj vivaj paroloj, sed ili povas ekkoni kaj lege ĝui ilian skriban verkaron, en kiu fidele speguliĝas ilia vervo. Tiun legadon mi konsilas al jam progresintaj freŝbakitoj, kiuj deziras pliprofundigi kaj pliriĉigi sian lingvoscion; ne por imiti ilin kiel modelojn, ĉar ĉiu el ili estas neimitebla - krom eble por virtuoza pastĉisto kiel BEAUPIERRE\* -, sed por ekkonscii pri la latentaj ebloj de nia lingvo, ekspluateblaj nur per intima praktikado.

Ni ne estas Ŝvarcoj aŭ Lantioj, sed ĉiu el ni, sur sia modesta skaloŝtupo, povas almenaŭ strebi al "ĝismedoleco" laŭ ilia ekzemplo, kaj tiel akiri propran stilon: nek genian nek talentan, sed personan. Al ni sufiĉu tiu limigita celo.

VALO

+ Tiu ĉi artikolo estis verkita antaŭ la forpaso de Ivo LAPENNA. (Red.)

\* Henri Beupierre: "Specimene".

\*\*\*\*\*  
Anonceto: Mi estas verkanta komputersprogramon por prezenti Esperanton. Ĝi estas skribita por AMSTRAD CPC-komputero. Se iuj legantoj de L! havas tiun komputeron, ili skribu al mi. Ankaŭ se ili havas alispecan komputeron, sed ili devos ĝin traduki.

J.S. BRILLEAUD


7 strato Frères Lumière

F-92500 RUEIL MALMAISON

Pro la neebleco disponi pri libertempo en la unua duono de junio por prepari L!, mi eldonis nur 36-paĝan numeron kaj iom frugis ĝian ekspedon.

Plej amikan saluton al ĉiuj kaj dankon pro ĉies indulgo!

Kribo



Jen nia 28a debato per ĉenleteroj. La temon sugestis kaj enkondukis Suzanne. Partoprenis: Pako, Ĵanseb, J.G., Jean-Claude, Nicole D., Lilia, Kristof kaj Oksana. (+ Garolo...!)

Suzanne:

Mi aŭskultis radiofoniaĵon, kies debatemu: "Denunco kaj fidenunco" estis interesa. Socia helpantino donis jenajn ekzemplojn pri denuncado: Se iuj vizitantoj konstatas, ke gepatroj aĉe zorgas pri sia infano, eĉ batis lin, ili denuncu tion, sed evitu enmiksi la policon, la juĝistaron, en la aferon. Alia ekzemplo: Pri incesto, ja denuncinda ago, iafoje okazis, ke la filino diris: "Dum la seksrilato mi ne konsideris lin kiel mian patron", kiam tiu ĉi aperis antaŭ la tribunalo. Pri fidenunco: En apartamentaro, loĝanto, ku deziris la apartamenton de maljunulo, denuncis lin kiel malzorgeman homon, ekzemple, ke li ne malplenigas la rubujon, kaj similaĵoj... La enketistoj, kiuj rilatis kun la maljunulo, konstatis, ke li estas ja tute alia, ol kia la loĝanto lin priskribis...

Por la ŝtatoj, kiuj timas pro sia sekureco, la fidenunco estas nepre necesa... Ju pli tirana la ŝtato, des pli nepra la fidenunco. Sed en tiaj kazoj la fidenunco havas limon; kiam ĝi tro abundas, ne eblas konsideri ĉiujn denuncadojn. Tio, laŭdire, okazis fine de la milito, ĉar la germanaj okupaciantoj havis, ĉiuflanke, pli gravajn zorgojn, ĉefe pro la diversaj batalkampoj. Tial oni hazarde elektis nur kelkajn denuncleterojn.

Efektive, la ŝtato nomas denunco, la agon profitdonan al ĝi, kaj la saman agon, sekreta, kaŝa, fidenunco, kiam ĝi malutilas al ĝi. La fidenunco trafas ne nur kulpulojn, sed ankaŭ senkulpulojn. Dum la lasta mondmilito estis 5000



denuncletoj pri grupo da judaj infanoj en lernejo situanta proksime de Liono. Post la milito enketisto renkontis okdek familiojn, kiuj kulpis tiun agon. Plimulto da deportitoj en Francio "ŝuldis" tion al denuncintoj. Bedaŭrinde, tiu agado ĉiam okazis kaj plu okazas en la homa socio... Simila fakto okazis ekzemple en majo 1871a dum la "Sanga Semajno" post la Pariza Komuno. La versajlaj trupoj estis fortege helpataj de granda parto el la parizanoj, kiuj surmetis trikoloran brakbendon, kaj denuncis la Komunanojn. Kiam vundito eniris en nekonatan domon, mortigis lin ne la trupo sed civitanoj mem, per siaj promenbastonoj... eble por forgesigi ian mallojalaĵon? Ni ne forgesu la teruran sintenon ankaŭ de najbaraj, de samklasanoj. La arkivaj dosieroj enhavas tunojn da denuncoj fare ne de burĝoj, aristokratoj, bienposedantoj aŭ militistoj, sed de ĵaluzaj najbaroj samklasaj.

De ĉiam la sekreta, kaŝa, fidenunco estis realaĵo, fakto. Ekzemple, Petro, renegato, sur kiu oni fondis la kristanan eklezion. Tiu fidenunco estis ĉe la bazo de la monoteistaj religioj...

En la plej eta urbeto estas denuncantoj, kelkaj "oficiale" dungitaj, kiel tiu, kiu informas la impostkolektiston pri la elspezoj de siaj najbaroj. Estas la "ruĝa", la "blanka", la "klerikala", la "kontraŭklerikala" denuncoj...

Iuj homoj estas nature denuncemaj, ĉiam profitcele, pro envio, kaj, pli aĉe, por ricevi monsumon. Ĉu lojala homo kapablas tiel agi? Ĉu lojala homo estas inda je tio?

#### **Pako :**

La diferenco inter denunco kaj fidenunco kuŝas nur en la prefikso "fi" kaj ĝia signifo, sed principe ili estas samaj vortoj. Nur kiam la celo de la denunco estas fia, ĝi iĝas fidenunco, kiu, kompreneble, estas malaprobinda ago.

Nu, la juro havas perfektan defendon kontraŭ ĝi: la nesufiĉo de la denunco por kondamni aŭ eĉ juĝi onin, tio estas, en sociordo (ŝtatoj) kie regas, se ne la justeco, almenaŭ la juro, sin kontraŭ denunco teknika povas damaĝi aŭ makuli neniun; necesas objektiva pruvo. En situacioj aŭ reĝimoj, en kiuj la denunco estas definitiva argumento, ĝi iĝas simpla leĝa armilo por satigi oniajn malamojn, enviojn, venĝemojn kaj similaĵojn. Tiel okazis ankaŭ dum kaj post la hispana milito, kiam multaj personaj disputoj solviĝis per (fi)denunco de unu el la kverelantoj kontraŭ la alia (denunci onin kiel ruĝulon estis tre efektiva).

Sed ni revenu al la ordinara situacio: tie, kie la fidenunco estas neutila kaj sendanĝera. Sed, ĉu vere neutila kaj sendanĝera? Mi diris, ke kiam juro regas, la denunco estas nedamaĝa

teknike, tio estas, antaŭ juĝistaro. Sed ĉu ankaŭ antaŭ la publika opinio? Jen ni alvenis al alia aspekto de la denunco: la klaĉaj mensogoj, duonveroj kaj similaj tendencoj eldiroj, per kiuj unuj provas malutili aliajn. Ĉi tio, male de la ĝenerala opinio, okazas ne nur en la politikista mondo, kvankam estas principe tie, kie la klaĉoj atingas sian plej popularan kaj faman gradon.

Perfekta socio ne atentus nefidindajn voĉojn; tiel la mensogoj kaj duonveroj ne tiom efikus. Tamen, ĉar ne ekzistas perfekta socio, la celato per klaĉoj plej ofte ne bezonas pruvi sian senkulpecon.

En perfektaj socioj la skribitaj kaj la moralaj leĝoj estas identaj; tamen, ĉar ne ekzistas perfekta socio, multfoje okazas ke oni denuncas ion lican sed morale kaj publike forte riproĉatan. Ju pli antaŭjuĝema kaj hipokrita estas la socio, des pli efikas tiaj klaĉoj, antaŭ kiuj la povra celato nenion povas fari.

#### **Ĵanseb :**

Denunco estas afero kun propra konscienco. Fidenunco estas - kompreneble - malaprobinda afero, sed tio estas nur vorto, kiun ebligas konstrui nia lingvo, sen postuli ke ekzistu faktoj.

Estas du ekstremaj sintenoj: instigi al denunco, kiel oni faris en Venecio, kie estis specialaj leterkestoj por anonimaj denuncoj. Aŭ tabuigi ĝin, similigante ekzemple la policon al nazioj kaj la gangsterojn aŭ infanmistraktantojn al rezistantoj - kio estas troigo.

Ambaŭ sintenoj estas evitindaj, kvankam ekstremaj estas pli facilaj : ili evitas okazigi al si moralan problemon, dank'al jam preta solvo. Pli malfacile estas taksita la malbonon, kiun oni farus al la kulpanto, kaj tiun, kiun oni farus al sia viktimo, ne denuncante lin.

Alia problemo estas, kiel montras **Pako**, denunco antaŭ publika opinio. Ĉar ĝi ne ĉiam havas logikajn kaj justajn reagojn, kaj ĝi povas malutili al senkulpulo. Sed denove temas pri konscienca problemo. Kiam komerca entrepreno trompas sian klientaron pri la kvalito de siaj produktoj, estas normale, ke la eblaj viktimoj estu informataj kaj ke la asocioj helpu ilin per "denunco", t.e. publikigo de, ekzemple, komparaj pruvoj.

#### **J.G. :**

Pri la unua kazo : Kiam infano estas batata aŭ miszorgata de siaj gepatroj, estas preskaŭ devo por la instruisto aŭ najbaro

averti socian helpantaron, lernejan kuraciston. En Francio ekzistas leĝo, kiu punas la personon, kiu scias kaj ne intervenas. Tiun leĝon oni nomas "nehelpado al persona endanĝerigita", tamen oni devas esti prudenta antaŭ ol forigi infanon el lia familio. Ofte okazas eskcesoj fare de la sociaj instancoj, kiuj ekzemple vidas nur la higienan vidpunkton sed ne la afekcian.

Pri la dua kazo, la fidenunco. Ĝi estas uzata de la policistoj, kiuj havas specialajn helpantojn, kiujn oni nomas "indikistoj", kies rolo estas raporti pri la agoj de suspektatoj, aŭskultante la konversaciojn en la drinkejoj, ktp. Ili agas kontraŭ mono aŭ protektado kaj havas ofte dubindan rolon.

Lastatempe la franca ministro pri la internaj aferoj en la kadro de la lukto kontraŭ la terorismo vokis la helpon de ĉiuj civitanoj, gluigante afiŝojn en la publikaj lokoj kun la portretoj de la suspektatoj (supozataj anoj de la movado "Rekta Agado"). Al la denuncantoj li promesis rekompencojn.

Ankaŭ kiam okazas enketo pri krimo, la policistoj diskonigas la robotportreton de la suspektato.

Tiuj metodoj estas sendube efikaj sed danĝeraj, ĉar kiom da personoj havas nur la malfeliĉon iom simili al la portreto de l' suspektato? En la plej oftaj okazoj la denuncitaj personoj estas senkulpigataj, sed kelkfoje ili ne havas bonan alibion. Pluraj juĝaj eraroj okazis tiamaniere.

En la totalismaj sistemoj la fidenuncado estas uzata kiel regrimedo. Oni devas denunci eĉ la anojn de sia propra familio, se ili ne estas bonaj subtenantoj de la reĝimo.

Ankaŭ dum la malkvietaj periodoj (militoj, revolucioj...) multaj personoj profitas la okazon por denunci la malamikojn aŭ simple la ĝenantajn personojn.

La limo inter denunco kaj fidenunco estas mallarĝa. Estas sendube konsciencia problemo, sed oni devas esti tre prudentaj, ĉar ofte la malaltaj instinktoj de la homo (ĵaluzo, vengemo...) superregas la konsciajn kaj helpemajn sintenojn.

#### Jean-Claude :

Certe iuj personoj emas al denunco, sed probable ankaŭ ĉiu el ni; ĉar diversgrade en ĉiu loĝas la samaj "demonoj". Kaj al neniu plaĉas senjusteco.

El tio sekvas, ke la justosento estas tre diverse interpretata kaj ofte kondukas al agoj plej fiaj.

Ĉiakaze, prava aŭ ne, denunco estas kolektiva afero. Ĉar justeco estas ne nur teknika afero lasata al profesiuloj, ĝi estas antaŭ ĉio homa demando.

#### Nicole D. :

Kiel vi reagis kaj daŭre reagis, vidante la afiŝojn de "teroristoj", de "fiuloj" sur muroj de publikaj lokoj?

Ĉu ne pensigaj la elacitetmonoj promesitaj por pli facile aresti ilin? Ĉu vi bone scias, ke laŭleĝe ni estas devigataj denunci krimojn, krimulojn kaj riskas punojn, se ni malobeas? Ĉu responsa civitano povas, devas sin deteni pri "sekureco", pri "socia ordo" kaj forlasi al fakuloj de la sekura, militista kaj justica ministerioj ĉiujn rajtojn kaj povojn?

Ĉu ne estas same malkuraĝe kaj mallojale nenion fari, diri, provi, antaŭ fiagadoj, fiuloj kaj fidenunci pro ĵaluzo, monavido aŭ vengemo? Tiuj sintenoj nenion solvas, ne permesas al individuo evolui, al socio progresi.

Pro timigo, moralaj, fizikaj torturoj, pro obeemo al ideologio, iuj fidenuncas, ankaŭ pro stulteco, kredemo, pro sen-scio eblas fidenunci. Ne ĉiam fidenuncantoj estas "monstraj", eĉ se ne eblas aprobi fidenuncon. Necesas koni la kialon, la celon de la denuncanto, gravas scii ankaŭ al kiuj sin turnas li aŭ ŝi, por pravigi aŭ ne denuncon.

Ŝajnas pozitivaj, aprobindaj denuncoj tiuj, kiuj ĉesigas dolorigajn, maljustajn, danĝerajn situaciojn.

Sin denunci, kiam oni kulpas pli-malpli grave, ĉiam aspektas kiel lojala, kuraĝa sinteno laŭdinda.

Antaŭ tiu morala problemo ne estas ebleco al honestulo, al prudentulo, fuĝi en neŭtralecon aŭ en nerespondecon...

#### Lilia :

##### **La homo : ĉu bona aŭ malbona ?**

Unue: taksu homojn laŭ la sistemoj al kiuj ili "apartenas" estas danĝeraĵo. Pro tio mi ne diros, ke ĉiuj homoj estas malbonaj : ili simple estas influeblaj fare de aliaj homoj (tiuj, kiujn oni nomas "la sistemo").

Due: ne ekzistas senkulpigo por aĉaj sintenoj aŭ faroj, ĉar ja tute ne temas pri "kulpo" sed pri respondeco. Juĝi signifas adopti starpunkton, racie. Tio racie kiom iu decidas denunci aliulon. TAMEN kredi ke sintenoj aŭ eĉ faroj estas regataj de racio estas tute simple ne koni la homon kiel tutaĵon nur ĝis certa limo memregeblan. Denunco ja povas esti sana kaj eĉ nepra ago : ĉio dependas de sia kriteriaro. La problemo estas: kiam du kriterioj absolute malkongruas kaj eĉ vundas sin reciproke, je kiu nivelo ambaŭ devas sin kontraŭ-

stari cele al mem-defendo? Racio? sentemoj? miksaĵo de ambaŭ? Ja: "kiamaniere konvinki iun?" : problemo tiom malnova, kiom la sociala mondo (farita de socialaj homoj).

Trie: multegaj aĵoj en niaj "sistemoj" konsistas el denunco en pli-malpli disvolvita stato. Bona ĵurnalisto estas tiu, kiu plej trafe denuncas: li estos "bona" por la denunc-aprobantoj, "malbona" por la denuncitoj. Ankoraŭ pli naive (kaj ŝoke, verŝajne): ĉu iu ajn konversacio meritanta la adjektivon "interesa" aŭ "profunda" povas okazi sen "komentarioj" (iuj dirus "klaĉadoj") pri... "la sistemo", aŭ pri la absurda vivo de tiu aŭ ĉi tiu homo, aŭ pri... ? Tiele dissemiĝas "ideoj", "vidpunktoj", "unuanimaj protest-movadoj" ktp. Ĉio dependas ne nur de la "intenso" sed ankaŭ de la "intenco" de la tendenco al denuncoj. El kio oni triste konkludas, ke aĉaĵoj (fietaj, fiaj aŭ fiegaj) estas viva ĝeneralaĵo.

Laste: se ĉiu ĉiam ĉion relativigus, ĉio irus pli bone en la mondo - sed samtempe eble tute ne antaŭenirus. Faru kiom eble plej respondece vian elekton.

**GAROLO :**

### Denunco estas kovardaĵo

Ne, **Suzanne**, lojala aŭtenta homo ne kapablas praktiki tian agadon : denunci. Kiel vi tion diris, la denunco elmontras la plej aĉajn fikvalitojn de l'homo; kaj la homo denuncas pro envio, ĵaluzo, avideco, orgojlo, ambicio, socia puritanismo, patriotismo, k.m.a. motivoj denaskaj aŭ altruditaj de nia "socia edukado". Viaj ekzemploj el la plej diversaj devenoj estas trafaj, ekde simpla incesto ĝis genocidoj al judoj, kaj la plenigo de koncentrejoj en Siberio, en Ĉilio, Argentino aŭ kie ajn okazas pere de denunco.

Rimarku bone, ke la denuncado estas ago individua rilate al kaj ene de kolektivaj dispozicioj, normoj, sistemoj. La denunco estas homa sinteno, kie, per siaj aparte malbonaj kvalitoj la homoj reagis en la kolektivo. Pro tio tute ne estas miriga la fakto, ke tio okazas en la plej terura sistemo, kiun la homoj inventis : la monstra ŝtato. Kiel dirite, avideco, ambicio, subaĉetado, koruptado, ktp... kaj denuncado estas normalaĵoj en la kolektivo, tiu moderna mito, kiun la homoj inventis pro kaj por individuaj interesoj evidente. Mi kredas, ke por la plimulto el ni, liberecanoj, memstaraj homoj, anarkiistaj aŭ similaj, kiuj kleriĝis, ne estas duboj: denunco estas ago de kovarduloj, kaj nenio kapablas pravigi tiun agon... aŭ ĉu oni devas akcepti la

falsan ideologion de la "konstruivistoj" (ankaŭ certaj marksistoj), kie la celo pravigas la rimedojn?

**Kristof' :**

Jen temo kiu ne inspiras min. Ĉiu civilizita homo konsentus konsideri, ke denunco estas produktaĵo de malaltaj moral-valoroj.

Evidentas, ke tio pli gravas dum periodoj de krizo.

Do mi konkludas, kiel oni diras franclingve, ke la ŝteliston la okazo faras.

Oni povas trankvile juĝi sidante en fotelo profunda, sed ĉu neniam la kialoj kiuj klarigas la agojn de homoj estas tiel simplaj? Ne!

Homoj estas faritaj el larmoj, sango, kaj la eventoj, laŭ mi, pli profunde influas agojn ol oni povus antaŭjuĝi.

.....  
**La aparta kontribuo de OKSANA :**

### "Afero de kuracistoj"

aŭ:lom pri funkciado de totalisma ŝtato.

Pro diversaj cirkonstancoj mi ne partoprenis en lasta ĉenleteraro de laŭtuloj. Sed la temo pri denuncado ial ne volis forlasi la kapon. Des pli ke dum la lastaj monatoj mi multe legadis la sovetian gazetaron, kiu iĝis nun neordinare interesa kaj preskaŭ ĉiutage liveras al siaj legantoj amason da pripensindaĵoj. Falis multaj tabuaj temoj kaj la sovetianoj ekparolis. Ho, kiom riĉas la denuncad-temo! Do, anstataŭ teoriumadi, mi preferis traduki artikolon pri reale okazinta afero en Sovetio (kaj tiuj realaj okazintaĵoj ofte superas la plej nigran imagon de scienc-fikciaj aŭtoroj!). Tial - pri la lasta afero de Stalin.

**"Fino de "Afero de kuracistoj".**

La 13an de januaro 1953 TASS informis pri aresto de grupo de kuracistoj. Kiel estis anoncote, la terorista grupo de kuracistoj celis per fuŝa kuracado mallongigi vivon de aktivaj agantoj de la Sovetia ŝtato. "Viktimoj de ĉi tiu bando de homaspektaj bestoj iĝis kamaradoj A. Ĵdanov kaj O. Ŝĉerbakov." Kaj plue: "Estas konstatite, ke ĉiuj partoprenantoj de la terorista grupo de kuracistoj servis al eksterlandaj spionadservoj, vendis al ili siajn animojn kaj korpojn, estis iliaj pagataj agentoj. La plimulto de partoprenantoj de la terorista grupo - Vovsi, B. Kogan, Feldman, Grinŝtejn, Etinger kaj aliaj - estis subaĉetitaj per usona spionadservo. Ili estis rekrutitaj

per filio de usona spionadservo - internacia juda burĝa-nacisma organizaĵo "Ĝojnt"... Aliaj partoprenantoj de la terorista grupo (Vinogradov, M. Kogan, Egorov) estas... malnovaj agentoj de la brita spionadservo."

La informo similis tondron el hela ĉielo. La korifeoj de medicina scienco kaj praktiko, laborantoj de Kremla polikliniko - spionoj kaj murdistoj? Homoj komence rifuzis kredi tion. Tamen, multaj ekkredis, rezulte la poliklinikoj iĝis malplenaj, la malsanuloj rifuzadis uzi pilolojn. La blankaj kitletoj timigis.

Kiel komenciĝis "la afero de kuracistoj"? El kio ĝi fontas? Iom da lumo ŝetas sur la okazintaĵon E.Smirnov - akademiano de Akademio de medicinaj sciencoj (AMS), Heroo de Socialisma Laboro, post la milito - ministro de sanprotektado en USSR. En unu el siaj intervjuoj li rememoras:

- Iom antaŭ la 13a de januaro 1953 mi gastis ĉe Stalin - en lia **daĉa**\*\* apud Soĉi. Ni promenis tra ĝardeno, interparolis. Stalin, montrante citron- kaj oranĝarbojn, rakontis kiel oni devas prizorgi ilin. Kaj subite sen ajna preparo li demandis:

- Kamarado Smirnov, ĉu vi scias kiu kuracisto kuracis kamaradojn Dimitrov kaj Ĵdanov?

- Mi scias, - respondis mi kaj nomis familinomon.

- Strange. La sama kuracisto kuracis, kaj ambaŭ mortis.

- Kamarado Stalin, la kuracisto pri tio nenion kulpas.

- Kiel "ne kulpas"?

- Mi mem interesiĝis pri la malsanhistorio de Dimitrov, pri patologia-anatomia konkludo. Mi povas certigi vin, nenion eblis fari. Mi scias, interalie, ke Dimitrov mem rekomendis ĉi tiun kuraciston al Ĵdanov. Li opiniis lin klera kaj taktoplena homo, kvalifikita specialisto.

Stalin silentis. Sed mi sentis ke mi apenaŭ konvinkis lin. Li ĉiam estis suspektema kaj fine de la vivo ĉi tiu trajto iĝis vere patologia.

Profesoro Jakov Rapoport, arestita dum "afero de kuracistoj" (liaj rememoroj aperos en revuo "Druĵba narodov" ("Amikeco de popoloj" - sovetia revuo, ruslingva) rememoras pri tio, kion siatempe rakontis al li V.Vinogradov :

- Dum sia lasta vizito al Stalin profesoro Vinogradov konstatis abruptan malpliboniĝon de la sanstato de sia paciento kaj skribis en dokumentoj pri neceso observi severan dieton kun haltigo de ĉiaspeca agado. Oni devas diri, ke post la morto de Stalin la diagnozo de Vinogradov evidentiĝis tute ĝusta. Sed dum la vivo de "la patro de popoloj" la politika naiveco de la

bonega kuracisto kostis al li enprizonigon kaj povis kosti la vivon : ja lia rekomendo estis komprenita kiel provo forigi Stalinon de ĉiaspeca agado, inter ili, kompreneble, ankaŭ la politika.

Kiam Berija, kiu prizorgadis la kuracadon de Stalin, informis al Stalin konkludon de Vinogradov, tiu terure koleriĝis : "Enĉenigi lin! Enĉenigi!"

La koleregeksplodo, ŝajnas, ne estis tute hazarda. Tute eblas, ke Stalin rememoris periodon de malsano de Lenin kaj sian rolon en izoligon de revolucigvidanto - sub preteksto de zorgoj pri lia sanstato - de la partiaferoj. Nun montriĝis ke li mem trafis similan situacion, kaj pri la plena trankvilo kaj ĉeso de ĉiaspeca agado insistis lia kuracisto...

Profesoro Vinogradov post iom da tempo estis arestita.

Arestoj de la unua grupo de la plej aŭtoritataj kuracistoj okazis en novembro 1952.

Arkitekto Leonid Kogan, filo de profesoro Boris Kogan, rememoras :

- Mi studis en arkitekta instituto, iuvespere mi revenis hejmen malfrue kaj subite aŭdis laŭtajn voĉojn en nia loĝejo. Ĉe ni okazis priserĉado. La patron oni jam kunprenis. La priserĉado daŭris la tutan nokton : oni frapadis murojn, serĉis armilojn, venenojn ktp. Mia patro, bolŝeviko ekde februaro 1917, estis batalanto por soveta regado en Volinjo (regiono de Ukrainio). Poste li plene dediĉis sin al medicino... Li kuracis multajn famajn agantojn de Kominterno, interalie li kuracis Dimitrovon (ĝuste lin menciis Stalin en interparolo kun tiama ministro de la sanprotektado Smirnov). La patro kaj Dimitrov estis amikoj. Kiel frenezige do estis al li aŭdi dum l'unua enketado ke li estas eksterlanda spiono.

Kuracistino Valentina Golub, filino de profesoro Jakov Gotlib, mortinta antaŭ tiuj tristaj okazintaĵoj, rememoras :  
- Mia patro kuracis kamaradon Bagirov - l'unuan sekretarion de CK de Kompartio de Azerbajĝano, kiu estis poste mortpafita. Estante en la 1946a jaro en Baku (ĉefurbo de Azerbajĝano), la patro devis fari al Bagirov proceduron, nomatan kromocitoskopio; por tio en vejnon oni enigis specialan solvaĵon. Do, komence oni ĉi tiun solvaĵon enigis en vejnon de la patro, nur poste - al lia paciento...

Sed ni revenu en jaron 1952. Nia familio amikis kun familio Vovsi. La 7an de novembro (festo de la Oktobra Revolucio) ni ĉiuj kune festis. Sed post iom da tempo ni ekscias: Miron Semenoviĉ estas arestita. Kial? Pro kio? Plena nescio. Dum la

*milito li estis ĉefa terapeŭto de la Ruĝa Armeo. Fama medicinisto, sciencisto - kio do okazis?*

Inĝeniero Lubov Vovsi :

*- Fininte Moskvan universitaton, mi edziniĝis kaj forveturis Leningradon. La Revoluciajn festojn de la 1952a jaro mi festis kun mia trijara filo ĉe gepatroj en Moskvo. La patro iris kun mi promeni. Lauvoje li subite diris : "Antaŭ kelkaj tagoj oni celebris 70-jariĝon de Vinogradov. Oni celebris tiom strange, kvazaŭ duonvoĉe. Kaj Egorov havas malagrabraĵojn..." Mi komprenis: la patro volis prepari min al okazantaĵoj. Verŝajne, li jam tiam divenis multon...*

*Maltrankvila mi revenis hejmen. Kaj nokte la 11an de novembro la patro estis arestita.*

La teruraj kulpigoj de antaŭe tiom estimataj homoj ŝokegis. Nur post iom da tempo iĝis konata nomo de Lidija Timaŝuk, simpla kuracisto de Kremla polikliniko, - evidentigis ke estis ŝi, kiu ludis ĉefan rolon en senmaskigo de "bando de krimuloj". Per ukazo de Prezidio de Supera Soveto de USSR ŝi estis dekorita per ordeno de Lenin. En tiutempa gazeto ni legas :

*"Antaŭ nelonge ni eĉ ne sciis pri ĉi tiu virino, sed nun la nomo de Lidija Timaŝuk iĝis simbolo de sovetia patriotismo, granda atentemo, nepacigebla kuraĝa lukto kontraŭ malamikoj de nia Patrujo. Ŝi helpis forŝiri maskon el vizaĝoj de usonaj servistoj, nehomoj, kiuj uzis blankajn kitelojn por mortigi sovetianojn..."*

Meze de januaro 1953 oni arestas edzinojn de "malamikoj de popolo", kaj iliajn infanojn oni komencas persekuti, pelas for el laborejoj, forigas el la partio, komsomolo...

Neniu el tiuj, kiuj figuris en la ĉefa listo de partoprenantoj de "terorista grupo", vivas nun. La lasta lasis ĉi tiun mondon 90-jara V. Vasilenko, Heroo de Socialisma Laboro, akademiano de Akademio de medicinaj sciencoj de USSR. Tre malvolonte ili dividis rememorojn pri travivitaĵoj en prizono. La jaroj ne forprenis ilian doloron, nur iom malpliigis ĝin; ili ne ŝatis kiam ies scivolemaj demandoj tuŝis malnovan vundon. Tial en la memoro de iliaj proksimuloj restis nemultaj epizodoj, ligitaj kun "prizona periodo"...

La enketadoj okazadis dumnokte. Dum enketadoj oni lumigis potencajn lampojn rekten en vizaĝon. La edzino de Vovsi - Vera, ekde tiam ne eltenis akran lumon.

De Miron Vovsi oni postulis konfesion, ke li estis agento de nazia Germanio. Miron Semenoviĉ diris al juĝesploristo: "Vi jam

faris el mi agenton de du spionadservoj, ne algluu almenaŭ la germanan - miaj gepatroj kaj familio de mia frato estis murditaj de nazioj en Dvinsk" (urbo en Latvio; latve: Daugavpils) Ne spekulaci per sango de viaj proksimuloj" - estis respondo de la juĝesploristo.

Pri la "afero de kuracistoj" persone respondecis ĉefo de juĝesplora fako de Ministerio de Ŝtata sekureco Rjumin. Homo absolute malmorala, cinika, sopiranta povon kaj karieron, li konscie falsigis dokumentojn de juĝesplorado. "Fosi" sub kuracistoj li komencis jam delonge antaŭ ilia aresto. Ankoraŭ antaŭ ol aperis en gazetaro informo pri "terorista grupo" viktimitigis ĉefo de elektrokardiografia kabineto de Kremla polikliniko Sofia Karpaj kaj profesoro Jakov Etinger. Oni akuzis ilin pri konscie malĝusta deĉifrado de elektrokardiogramo de A.Ĵdanov. Etinger ne eltenis enprizonigon kaj mortis.

La arestoj plimultiĝis, Rjumin jam ĝojis pri brua juĝproceso, kariera kresko... Kaj venis morto de Stalin. Enprizonigitajn kuracistojn pri tio oni ne informis. Enketadoj daŭris, sed kun malpli da persistemo, kvazaŭ inercie.

Multaj el tiuj, kiuj restis liberaj - infanoj kaj parencoj de arestitoj - havis jenan reagon : "Nun al niaj proksimuloj neniu helpos". En Stalin ili vidis savanton kaj defendanton...

Kaj jen venis nokto de la 3a kaj 4a de aprilo. Subite oni eligis ĉiujn arestitajn kuracistojn kaj iliajn edzinojn el prizono, metis ilin en aŭtojn kaj veturigis en iliajn hejmojn. Nur alveninte hejmen la kuracistoj eksciis pri tio, kion skribis pri ili la gazetaro, kaj ke Stalin mortis...

Matene la gazetoj aperigis informon, en kiu, interalie, estis dirite: *"La enketado montris, ke la akuzoj... estis falsaj, kaj la dokumentaĵoj, kiuj servis al la juĝesploro, senpruvaj. Estas konstatite, ke la konfesoj de arestitoj, kiuj kvazaŭ konfirmis akuzojn kontraŭ ili, estis ricevitaĵoj... per mallegalaj kaj severe malpermesitaj... metodoj."*

Sube sekvis teksto pri nuligo de ukazo pri dekorigo de L. Timaŝuk per ordeno de Lenin. Ŝi mem daŭre laboris en la polikliniko kaj poste emeritiĝis. Pri tio necesas diri ankaŭ pro tio, ke ankoraŭ nun iuj kredas al onidiroj ke ŝi pereis en aŭtomobilakcidento meze de la 50aj jaroj, iĝinte viktimo de ies venĝo. Ne, ŝi tute trankvile ĝisvivis maljunan aĝon...

Rehonorigitaj, revenis al fruktodona laboro sur medicina kampo Vovsi, Vinogradov, Kogan, Egorov, Feldman, Vasilenko, Grinŝtejn, Zelenin, Preobraĵenski, Popova, Zakusov, Ŝereŝevski, Majorov kaj aliaj.

Kio rilatas Rjumin, do, kiel estis skribite en registara

informo, "konsiderante apartan danĝeron de lia agado kaj pezono de faritaj krimoj, la Militista Tribunalo de Supera Kortumo de USSR aljuĝis al Rjumin la plej altan punon - mortpafigon". La severa puno atendis ankaŭ aliajn kunlaborantojn de Ministerio de Ŝtata Sekureco, kiuj estis ligitaj kun falsigado, preparado de mensogaj akuzoj.

Tiel estis metita la lasta punkto en "afero de kuracistoj".

David Gaj

(gazeto "Kampanaj novaĵoj", 14.02.1988)

Jen epizodo el vivo de la t.n. "unua laboriste-kampana ŝtato de la mondo". Feliĉe - pro morto de l'Tirano - dekoj da homoj saviĝis. Kaj la denuncistino? Atingis emeritaĝon. Ne miru do, ke multaj kontraŭuloj de la nuna "perestrojka" en Sovetio. Multas en ĝi similaj Timaŝuk kaj Rjumin en emerita aĝo...

Tradukis (kun iomaj mallongigoj) kaj komentariis **Oksana**.

\*\*\*\*\*

## Erich Fried : La libero malfermi la buŝon

La libero malfermi la buŝon  
ekzistas ankaŭ tie  
kie aliaj krias :  
Al ili ni fermos la buŝon !

Male  
Oni devas starigi nur liston  
kio entute elvenas  
el buŝoj kiuj laŭdire fermas

Unue krioj  
due komence kaj  
tute fine  
eble eĉ protestoj

Trie dentoj  
kaj kvare sango kaj kvine  
vomitaĵoj  
kaj sese en multaj kazoj

likvaĵoj  
kiujn oni antaŭe enigis  
per hosoj aŭ  
per mergado de kapo

Oni ne rajtas partii rigardi tion  
ĉar la libero malfermi la buŝon  
estas sama rajto por ĉiuj  
Ekzemple ankaŭ por la instancoj

malfermi la obstine fermitan buŝon  
de prizonulo  
Kio tiukaze envenas ?  
Multe da akvo aŭ multe da oleo

aŭ kalkanumoj de botoj  
aŭ feko kaj sangaj ĉifonoj  
aŭ urino  
aŭ seĝpulvoro aŭ tero

Kaj elvenas ĉe tio  
se iras laŭdeziro  
la libervola konfeso

La buŝon oni fojfoje lezas  
sed neniam la liberon  
malfermi la buŝon  
Ĝi ankoraŭ eĉ nun regas - tiel aŭ tiel  
- en ĉiuj niaj landoj

(tradukis Hagen Hirte)



## VORTOJ DE MALJUNULO

— — —  
valo  
— — —

### Baloto en Francio

Unue mi avertas, ke la sekvontaj linioj esprimas nur mian personan, privatan opinion. Kaj komence mi deklaras, ke laŭ mi, baloto, per kiu la "suverena popolo" elektas siajn politikajn mastrojn, estas farso, en kiu ne devus partopreni konscia civitano. Konforme al tiu deklaro, mi dum multaj jaroj tiel agis, aŭ pli ĝuste ne agis. Poste mi ŝanĝis. Kial? Ne postulu de mi logikan sintenadon.

Do, la 24an de aprilo kaj la 8an de majo, ni elektis nian prezidenton. La unuan fojon estis naŭ kandidatoj, la duan restis nur du. En la unua, oni voĉdonas por tiu, kiun oni opinias la plej bona. Mi donis mian voĉon al Waechter, la ekologia, kiu cetere havis nenian ŝancon : li ja ne atingis 4% el la bultenoj. En la dua, oni balotas kontraŭ tiun, kiun oni opiniis la plej malbona. Laŭ mi la du restantaj estis malbonaj, ĉar ambaŭ volis konservi la nuklean armilaron; sed pli malbona estis tiu, kiu estas reprezentanto de la kapitalista "liberalismo" (t.e. por la mastroj la rajto libere ekspluatadi la laboristojn), objektiva aliancano de la rasisto-faŝisto Le Pen (kiun li oficiale forĵetas), kaj masakristo de kanakoj en la nomo de la nacia suvereneco. Do mi, sen entuziasmo, helpis al la sukceso de Francisko Mitterrand. Do, kiel bona civitano, mi pagos impostojn por fabriki nukleajn kaj aliajn armilojn. Same estus, se la elektita prezidento estus Chirac, ĉar per mia propravola partopreno en la balotado, mi antaŭakceptis ĝiajn konsekvencojn.

En ĉia okazo mi estas maljuna stultulo.

\*\*\*



## Pri insidaj venenoj

En L! 76 mi parolis pri la cigaroj de George Sand, kiuj estis por ŝi manifestado de virina emancipiĝo, en tiu epoko, kiam fumado estis laŭmore rezervita al viroj.

Nun tre multaj geadolestantoj, eĉ tre junaj, fumas tabakon aŭ haŝiŝon, ĉar por ili tio estas signo de liberiĝo. Ĉu ĝuste?

Miaopinie, oni ne liberiĝas per akiro de kutimo, kiu baldaŭ fariĝas servutiga. Oni komencas per kelkaj cigaredoj, oni finas per ĉiutaga pako. Tiel oni endanĝerigas sian sanon, kaj estas malfacile eskapi el tiu kutimo, kiel el tiu de stuporigaj drogoj. Fumado estas sklaviga.

Nu, rebatos iuj, se mi konsentas plifruigi mian morton, tio estas rajto mia, kiu koncernas neniun alian. Erare! Rajto via, sendube, se vi atencus nur al via propra sano, al via propra vivo - vi eĉ rajtas memmortigi, se al vi plaĉas - sed ne atenci al alies sano. Se per via fumado vi difektas alies pulmojn, vi povas kaŭzi kanceron. Vi transas la limojn de via libero, ĉar vi tiel damaĝas alies liberon. Se vi vere volas esti plene libera, vivu en dezerto, tute sola kiel ermito, ne en socio.

Samon mi dirus pri alkoholismo. Ĉu drinkulo damaĝas nur sian propran sanon? Pensu pri tiuj, kiuj bategas siajn infanojn, kiuj postlasas al ili malsanan heredon; pri tiuj, kiuj murdas sub influo de alkoholo; pri tiuj kondukantoj de aŭtoveturiloj en ebria stato, kun pluraj gramoj da alkoholo en la sango, kiuj kaŭzas mortigajn akcidentojn. Al tiuj ĉi la francaj tribunaloj ofte estas strange indulgaj. Ili kondamnas tiujn senkonsciajn murdistojn al kelkmonata mallibereco, plejofte nur aŭ grandparte surpapere, seŝ efektiva enkarcerigo, kaj al mallongdaŭra senigo je la ŝtirpermeso (cetere kun eblo tuj rekandidati por ĝin ricevi).

- Ĉu do vi postulus, ke oni longe malliberigu ilin?

- Ne : oni lasu ilin liberaj, sed ne liberaj mortigi senkulpulojn per sia nerespondeca sintenado sur la vojoj. Kion mi postulus, tio estas, ke ili estu dumvive senigitaj je la rajto stiri aŭton.

- Sed por multaj el ili (ekz. kondukistoj de ŝarĝveturiloj) tio estas ilia vivrimedo.

- Ĝuste tial ili devus, eĉ pli ol aliaj, zorgi ne fariĝi publikaj danĝeroj. Se drinkema aŭtisto perdos sian postenon, li serĉu alian malpli danĝeran metion. Por lin anstataŭi troviĝos iu sobra senlaborulo : do, se li mem ne tuj trafos alian dungigon, tio ne faros unu plian senlaborulon.

Strange, laŭ multaj juĝistoj, ebrieco estas kvazaŭ senkulpiga

cirkonstanco, inda je indulgo, facilanime pardonebla. Miaopinie ĝi estas, male, pligraviga : ĉar antaŭ ol atingi ebrian staton, oni necese drinkas, kaj antaŭ ol drinki oni estas sufiĉe konscia por pensi pri la konsekvencoj. Prava estas la slogano : Ĉu drinki, ĉu stiri, endas elekti. Se iu elektas drinki kaj stiri, li estas simpla krimulo.

## La gardostarado

En 1924 en Wiesbaden, fronte al la hotelo, en kiu mi tiam loĝis, staris eks-imperia palaco. En ĝi estis instalita la stabo de la franca okupanta armeo. Tie mi ofte vidis la ŝanĝon de la gardantaro. Soldatoj el ĉiaj regimentoj, en diversaj uniformoj. Rajdantaj "spahioj" kun sia granda ruĝa mantelo, nord-afrikaj tiraljoroj kun la "nuba" (araba muziko), hindo-ĉinoj kun grandega arta drako el bunta papero : grandioza spektaklo.

En 1934, en Londono, alia fama spektaklo, kiu ĉiam altiras multopan amason, nome la ŝanĝo de la gardantaro ĉe la reĝa Buckingham-Palaco. Vera baletto, tre precize organizita, de la "Life-Guards" kun ilia alta kapvesto, dum la militista muziko ludas klasikajn ariojn.

En 1970, sur la Atena Akropolo, ŝanĝo de la gardantaj "evzonoj" kun ilia pitoreska kreta kostumo, dum la radioj de la subiĝanta suno ruĝe lumigis la malantaŭan fasadon de la Partenono. Belege!

En 1965 mi instaliĝis en Nimo inter preskaŭ 200 000 loĝantoj. De tiam mi ofte vizitas la lokan esperantistan grupon. Ĝi kalkulas tridekon da kotizantoj, inter kiuj ĉiusemajne kunvenas deko, ne ĉiam sed ofte la samaj fideluloj. En tiu mallmultopa kerno, en la daŭro de deko da jaroj, mortis kvin el la plej malnovaj, plej fervoraj, plej kapablaj kaj sindonemaj samideanoj. Feliĉe ĉiujare alvenas du aŭ tri novaj komencantoj, el kiuj kelkaj persistas, kaj fariĝas veraj esperantistoj.

Probable, kaj esperinde, mi estas la plej baldaŭ forpasonta, ĉar mi estas la plej maljuna. Tial mi ĉiam ĝojas pro la alveno de tiuj gejunuloj, kiuj anstataŭos nin. Foriras la maljuna gvardio, venas la nova, kiu daŭrigos la gardostaradon ĉirkaŭ nia komuna afero, ĝin prizorgos kaj flegos, kaj pli kaj pli vigligos. La torĉo pasas de mano al mano, kaj ne estingiĝas. La gvardio ŝanĝiĝas, kaj la diligenta kolegaro, senfine rejuniĝante, firme tenadas nian lingvon viva.

Adiaŭ do al la bone laborinta maljuna gvardio, kaj bonvenon al la juna forto de la esperanta juna gvardio!

Valo



## Pliaj informoj pri KODURO kaj la planita julia renkontiĝo

### Pri la loko

KODURO (Cauduro) situas en Hérault je 40-kilometra distanco de Béziers. Oni ĝin atingas \* aŭtomobile, per la nacia vojo N 112. Ĝi situas inter St Pons kaj St Chinian, en la direkto al Pardailhan (vd. la desegnon). \* trajne, ĝis Béziers, kie eblas trafi aŭtobuson al "La Salvetat" aŭ al Castres. Oni haltu ĉe la haltejo "Rodomuls" je kelk-kilometra distanco de Koduro. Kompreneble, se vi sciigos nin sufiĉe frue pri la tago kaj proksimuma horo de via alveno, certe iu povos renkonti vin en Rodomuls - aŭ eĉ eventuale en Béziers. Eblas lasi lastminutan mesaĝon ĉe la ŝafistoj de la vilaĝo (telefonnumero: 67/97.17.46), sed ili ne estas esperantistoj!...

Je la alteco de 610 metroj, Koduro estas somere varma (eĉ varmega) kaj seka - sed forta tramontano foje blovas. La noktoj povas esti malvarmetaj. La ĉirkaŭaĵoj estas bele sovaĝaj. Ĝis kie la rigardo povas atingi : montetoj arbaraj aŭ rokaj, delikate parfumataj de sovaĝaj lavendo kaj timiano. Ne eblas ĉion priskribi : ĉiu devas mem malkovri, mem ĝui. La plej proksima magazeno troviĝas je 10-kilometra distanco, en St Chinian.

### Pri la restado

Komforto ne estas en Koduro.


Tamen dank'al interkonsento kun instruista asocio, kiu posedas en la vilaĝo loĝeblan domon, estas disponeblaj por nia uzo :

- 20 litoj en komuna dormejo (kunprenu littukojn kaj kovrilojn aŭ dormosakojn).
- komuna kuirejo kun la necesa kuirmaterialo.

- necesejoj kaj duŝoj (mankas nur varma akvo!)

Eblas ankaŭ tendumi - sed eksteraj fajroj estas malpermesitaj dum la somero.

Koncerne la manĝojn, ni proponas komunan kuiradon kaj dividon de la taskoj kaj de la elspezoj (kiel eble plej modestaj). Pluraj el ni emas manĝi malmulte da viando kaj multe da ĉiuspezaj sezonaj krudaĵoj - sed ĉiuj povos laŭvice proponi siajn plej ŝatajn manĝaĵojn.



1 : D 179 → Pardailhan (P)  
2 : D 179 E → Cauduro (C)

Béziers → N 112

### Pri la (laŭeble) farota laboro

Necesas unue disfaligi la restantajn ruinajn murojn kaj pretigi ebenan cimentan surfacon, bazon de la estonta konstruaĵo.

Aliflanke pli malpezaj laboroj ne mankos en la pruntita domo por ĝin plikomfortigi.

### Kaj pri Esperanto...

Krom la ĉiutaga uzado de Esperanto - kiu kompreneble dependos nur de ni ĉiuj - ni deziras profiti de nia kunvivado por ĉiumaniere pliprofundigi niajn konojn pri la lingvo. Laŭ viaj bezonoj, deziroj, preferoj, multaj eblecoj ekzistas :

- interŝanĝoj pri la lingvo (gramatika punkto, vortoj, esprimoj...)
- komunaj tradukaj ekzercoj (francen aŭ esperanten)
- lingvaj ekzercoj kaj/aŭ ludoj
- surbendigo de teatraĵetoj, poemoj, tekstoj...
- kantoj, rakontoj...
- ktp, ktp...

Ĉio estas ebla sed ĉio dependas ĉefe de viaj proponoj, kontribuoj, kunlaboro. Kunportu ĉiujn materialojn (librojn, kasedojn, foliojn...) kiujn vi ŝatus kunstudi, kunuzi, kunĝui kun la aliaj, ĉiujn ne-solvitajn problemojn iam renkontitajn, ĉiujn ideojn por komunaj lernado, ludado, plezuro.

**BONVENON AL ĈIUJ !**

N.B. Por komenci la rekonstruon ni bezonos aĉeti diversajn materialojn kaj ilojn. Ĉiuj mondonacoj eĉ modestaj estos bonvenaj. Antaŭdankon.

Estraro kaj adresoj :

prezidantino: Nicole PAIROUX, rue Saint-Luc 35, B-5004 Namur  
sekretario: Akiles SANZ, Hafenplatz 6, Ap.206, D-1000 Berlin 61  
kasistino: Catherine SANZ, 9 av. de Verdun, F-60200 Compiègne  
Poŝtkonto: PARIS 21 747 70 L (MONDHEJMO - CTRE ECO INTER)  
9 av. de Verdun, F-60200 COMPIEGNE

\*\*\*\*\*

Por la VIII-a pionira renkontiĝo (Temo : Esperanto - lingvo de la paco) en GDR, en aŭgusto 1988, en distrikta urbo Karl-Marx-Stadt, ni eldonis specialajn glumarkojn kiujn mi ankaŭ sendas al interesataj esperantistoj kontraŭ 0,20 markoj por ĉiu ekzemplero.

Christian PAPANMEIER  
DDR-9156 OELSPLITZ  
Obere Hauptstr. 104



# La renkontiĝo de ge-Laŭtuloj en Beauville

de la 30a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1988  
(Validas ĉiuj informoj aperintaj lastpaĝe de L! 75)

Kiam aperis nia anonco en la januara n-ro, ni ankoraŭ ne sciis, ke ni certe devos baldaŭ forlasi la stacidomon de LAROQUE, kie jam de longe troviĝas la "Laŭtejo", kaj ke ni do devos plejble frue loĝebligi kaj ekipi nian muelejon "Moulin de Cargue Sac" en Beauville por unuflanke mem loĝi, kaj, aliflanke instali tie la "eldonejon", la broŝurdeponejon, E-bibliotekon, ktp. Tio ja iel kompletigas nian projekton fari el tiu pitoreska bieno renkontiĝejon, restadejon por geamikoj de L!, de Mondhejmo, de la Amikeca Reto de SAT, kaj similaj afinecaj amikoj, eĉ neesperantistaj.

**Loĝado :** La kunvenejo situas sur somere malvarmeta teretaĝo el proks. 120 kvadrataj metroj. Sur supre samsurfaca unua etaĝo troviĝos someroj kaj matracoj. Ni kune aranĝos, por ke ĉiu povu bone tranokti; familioj kaj paroj povos eventuale disponi pri aparta ĉambro (sume 4).

**Manĝoj :** Eblas aĉeti en la apuda, beleta vilaĝo (je 2 km), kunprepari la manĝojn kaj dividi la elspezojn.

**Programo :** Jam notitaj estas multaj programeroj : botanikaj piedekskursoj, kunverkado de temenkondukoj por venontaj ĉenleteroj, E-lernado kaj perfektigo, kanzonoj (kun NIKOLIN'), debatoj ("Ĉu ekzistas E-kulturo kaj E-popolo?", "Komercaj aplikoj de E"...), pretigo de la renkontiĝejo kaj ĉirkaŭaĵoj, ktp, kc.


**Partoprenontoj :** Por tiu unua renkontiĝo (kiun certe sekvos multaj aliaj, kaj ne nur somere) sufiĉos 15/20 personoj. Jam 13 sin anoncis.

**Anoncu vin !** Se vi deziras alveni pli frue aŭ foriri post la 7a de aŭgusto, se vi alvenos trajne kaj deziras ricevi taŭgan trajnhoraron, kaj ke ni aranĝu vian veturadon de la stacidomo de Laroque aŭ Agen al Beauville, skribu al ni kaj notu la utilajn telefonnumerojn :

Stacidomo de Laroque, kie Kribo deĵoros ĝis la 14a horo : 53 95 71 28.

Post la 14a, en la loĝejo de la stacidomo : 53 95 75 03 aŭ en la muelejo mem : 53 95 40 26.

**Por aŭtomobile atingi Beauville :** De Agen, uzi la D 656 ĝis loko LT



# ĈIES VOĈO

## NEOLOGISMOJ...

Kiel k-don Rejal (L! 76) iom ĝenas min tro da senutilaj neologismoj. Iuj estas nepre necesaj por esprimi novajn konceptojn kaj novajn aferojn, kiuj ne ekzistis antaŭ cent jaroj; aliaj estas oportunaj en poezio, ankaŭ en prozo, por anstataŭi tro longajn kunmetaĵojn. Sed ili estu konstruitaj almenaŭ laŭ la esperantaj reguloj (elekti nacian vorton kaj aldoni al ĝi: a, o, i, ne estas taŭga rimedo). Ĉiel, ni restas tute liberaj uzi la malnovajn vortojn kun certeco esti komprenataj. Zamenhof mem diris, ke ĉiu povas enkonduki novan vorton, sed la decido akcepti aŭ forĵeti ĝin apartenas al la tuta esperantistaro. Nu, se vorto ne plaĉas al ni, ni ne uzu ĝin kaj ĝi ne prosperos. Se ĝi prosperos, t.e. se ĝi estos uzata de multnombraj esperantistoj, ĝi estos fine akceptita en la vortaroj kaj de la Akademio. Ĉar la Akademio, ni tion ne forgesu, ne regas la lingvon, sed kontrolas ĝian fundamentecon, proponas aliajn solvojn por tiklaj punktoj, kaj konsilas.

K-do Rejal aludas la vorton FAR. Alia afero. Laŭ mi, PIV ne plene pravas, dirante ke FAR, FARI estas konstruita analoge al PER, PERI. PER ja estas esperanta fundamenta prepozicio, de kiu oni derivigas la verbon PERI. Cetere oni derivigas verbon de kelkaj aliaj prepozicioj : SUPER, SUPERI - ĈIRKAŬ, ĈIRKAŬI, k.a. Ĉe FAR, FARI, estas tute la malo! oni uzas verban radikon kiel prepozicion, kio estas tre diskutibla. Persone, mi ne ŝatas la vorton FAR, kiu ŝajnas al mi peza, plumbe falanta en la frazon. "e de" aldonas al ĝi kvazaŭajn flugilojn. Sed PIV permesas la uzon de FAR anstataŭ FARE DE. Nu, al kiu plaĉas, tiu ĝin uzu, sed almenaŭ korekte; ĉar en tio kuŝas la danĝero : oni ofte uzas FAR, ne anstataŭ FARE DE, sed kiam estus gramatike korekta, sufiĉa kaj ne konfuziva la simpla DE. (Vd. PIV ĉe la artikolo "de", A.4).

Denise Castelló.

## ESPERANTO MASAKRATA!

(fare de "poetoj" per nenecesaj duoblaĵoj!)

Por komenci, jen ekzemplo de nova ĝenro poezia. Vere vorolda!

OLDIVA ESPERANTACO AŬ ESPERANTAĈA OLDIVO

Jen kiĉa sketolda laŭsivo  
de kurta duoldo stringivo,  
mungiga turpolda vorivo,  
povroza tristolda pokivo,  
molesta mavolda stinkivo!

(Kia naŭzo! Vere vomiga! Koprofagoj nomas tion Esperanto kaj ŝategas ĝin!)

-----

Renkontinte la vorton HANDIKAPULO, mi provis analizi ĝin laŭ la Esperantaj reguloj de vortkunmetado, sed mi ne certas ĉu mi sukcesis: 1. HANo: ĉina (ĉefa) gento. 2. Dio. 3. KAPO. 4. ULO. Sekve: HAN DI KAP ULO estas ulo kun kapo de dio de ĉina gento.

Jen alia analizo kiun mi provis: HAN DIKA PULO: pulo de dika ĉina gento.

Per HANDIKAPO mi provis ankaŭ alimaniere: Al la vortradikoj: HAN-DI- (sen kapo!) mi aldonis: KEPO (ĉapo kun viziero); kipo (kordeto kun nodoj anstataŭanta la skribon ĉe pra-peruanoj. - Neregistrita en PIV!-); KUPO (kloŝeto); kaj mi ekhavis: HANDI-KEPO, HANDI-KIPO, HANDI-KUPO, respektive: ĉapo, nod-skribo kaj kloŝeto de ĉina genta dio.

Sed mi ne komprenas kial en Esperantaj publikaĵoj oni parolas nur pri la KAPO de ĉina genta dio, sed neniam pri ties kepo, ĉar fakte, kio estus pli oportuna por kapo ol kepo? Kiel ajn estas, mi eĉ malpli komprenas por kio taŭgus al tiu dio: kipo kaj kupo.

Jen kial por mi ĉi tio apartenas al la grandaj misteroj de Esperantujo, nome, de la Esperanta Mondo.

Alia mistero: Kiel eblas uzi infinitivon de verbo (Parenteze: poezivortaĉo!) kiel propran nomon? Jen LANTI! Ĉu li estis poeto? Ne! Ĉu li malrapidis? Ne! Ĉu eble TI(o el) LANO? Sekve: LANTIO! Jen la nesolvebla mis-tero, nome, erara tero, kiun mi provis el-ter-igi aŭ el-mis-ter-igi! Kial ne Eŭgeno LANTO? (Eventuale: LANTIO!)

Le mi legis ke pro FRISKA vento oni malvarmumis! Ĉu pro tio ke sen la komenca litero: f, ĝi fariĝas RISKĀ? Sed estus tute same ĉu la vento estus BRISKA, DRISKA, GRISPA, PRISKA aŭ TRISKA! Tial preferindas: FREŜA vento, kiu ne estas riska!

PROVU KOMPRENI: Lante kurtas noca livo aŭ noce lantas liva Kurto pro la frida bruska brisko, freska trisko en Halisko! (: Meksiklanda regiono - Neregistrita en PIV!-)

Tamen el la tuto de la poezivortara plago, akcepteblas ĉiukaze nur tri, pro speciala oportuneco: KURToNda (teknikaĵo), FRIDUJO (malpli peza kaj pli moderna ol glaciŝranko), turnu LIVEN (kiu evitas konfuzon kun: turnu MALDEKSTREN, kaj povas eviti miskomprenojn kaj akcidentojn, se uzata en vojsildo en kiu aperus forviŝitaj ekzemple kelkaj literoj: TURNU ...EKSTREN. (Mankas: MALD- sed oni povus pensi ke mankas nur: D.) Ankaŭ iom rapide parolante povus estiĝi konfuzoj kaj okazigi akcidenton!

## ERGOTO DE BONAERO

### DON ERGOTO JAM SURVOJAS

Mi jam pensis, ke la bona olda Don Kiĥoto nun por ĉiam mortas, sed ne, ĉifoje li releviĝis por savi Esperanton, precipe kontraŭ degenero kaj ĥaoso. Jen tasko, kiu indas por nobla homo. Kaj Don Ergoto havas la aplombon, kiu necesas por tio. Li elmetas sian lancon, lasas fali la vizieron kaj ...atakas. Sen palpebrumo li mortpikas elegantmaniere, kiel decas por vera kavaliro, per belaj versoj, la aĉan grase dikan PIV-on. Li faras tion por savi la mondon verdan. Enestas profunda senco en tio, se li murdas la aĉajn vortojn kaj ĵetas maren ilin. Temas pri tio, ke la bela ŝipo E-o ne dronu per ia mistera transŝanĝo al paralela pseŭdoesperanto. Imagu la apokalipsan bildon, terure!

Kia kuraĝo! Kia forto! Flankenflugas ĉio, kio laŭ Don Ergoto nur balastas. Estas mirinde, kiel decideme li elpaŝas. Do, flanken amikoj! Ergoto survojas! Kia survojas: La PIV aĉas kaj fino! Kial ni ne rimarkis tion ĝis nun? Nur tial, ke ni estas bedaŭrinde la gefiloj de Sancho Pansa, kiu, kiel konatas, devis fari la laboron por la granda idealisto. Granda aro de homoj tute superflue laboraĉis dum multaj jaroj, por ke tia ampleksa verko, kia estas la PIV, fine povu eliri, kaj tamen ili ĉiuj estis nur idiotoj kaj ne farintus tion, se ili estus havintaj la bonŝancon konatiĝi al la nova Savanto, kiu trovis la solvon: Mortbato de vortoj!

La unuan vorton, kiun li tralancas, estas la vorto "humuro" kiu laŭ li samsencas al la vorto "sprito". Mi ĉiam pensis, ke humuro povas esti ankaŭ sensprita afero, videble mi eraris, for la humuron! Sed ne, la bona vorto humuro troviĝas ja en la Plena Vortaro sur paĝo 179. Tre strange, ĉu

ne? Kion pensi pri la kavaliro? Li asertis, ke humuro estas vorto el la aĉa PIV-testamento.

Sed ni rigardu plu, jen ekzemple la mortkondamno por la vorto "puĉo", kiu preskaŭ ĉiutage en la gazetoj troveblas, ĉar ĝi tiel internacias kiel apenaŭ alia vorto. Nia kara Don prezentas "ŝtatrenverso" por tio, kvankam puĉo tute ne devas finiĝi per ŝtatrenverso, eĉ male, la plej multaj puĉoj trovas sian finon per enkarcerigo de la puĉistoj. Kion fari venonte en tiu kazo? La Savanto helpas, ĉar ekde nun ĉiuj puĉoj devos renversi la ŝtaton, alikaze, la Savanto estus ĉarlatano. Jen oni vidas kiel facile estas forigi la ŝtaton. Oni devas preni nur la ĝustan vorton.

Ke "certaj" homoj nur "iuj" homoj estas, same tre faciligos multon. Dankon por tio! Kial ni cerbumis ĝis nun tiel ofte pri certaj homoj, estas ja nur iuj homoj, ke mi ne rimarkis tion ĝis nun, stultulo mi estis!

Kaj, ke la vorto incendio estas blasfemo, finfine komprenigas min, kiom da vortoj mi uzis tro facilanime ĝis nun. Ja ankaŭ la vorto "ripeto" - mi konkludas kuraĝe - estas forĵetinda, ĉar ne estas pli ol ripa eto, do preskaŭ nenio, do for la vorton. Pri multaj aliaj vortoj, mi eĉ ne kuraĝas pensi, kio tiukaze restus?

La kavaliro plene pravas, kial precizigi per vortoj? Jen afero por ĥaosuloj. Ekzemple la vorto sketo, kvankam tre preciza, ja anstataŭeblas per "glito". Sekve ni venonte ne plu devos paŝi, ambli, troti, ktp, ni simple glitos. Ĉu ne vere genia metodo? Ni forlasas la aĉajn vortojn. (Purigitan liston ni baldaŭ ricevos de la kavaliro) kaj tuj E-o rebrilos.

Multe helpas ĉe tio la kontraŭdiroj enmondaj. De ĉio ekzistas malo. Kial do peni pri rektaj vortoj, estus trista kaj teda negoco, inda por infanoj. La frazo: "La malbela maljunulino malmulte malavaris male al iuj malicoj" plene sufiĉas por ni. Ni gardu nin kontraŭ degenero kaj ĥaoso. La vortoj regas la mondon, kaj ne male, mi nun lernas dank'al Don Ergoto.

Eĉ pri la senkulpa vorto "havi" mi krimis ĝis nun. Ergoto plene pravas: en la varo-mono-socio havi estas posedi! Do, ni ne plu havas bonan koron, sed ni posedas ĝin. Ni ne plu povas diri: Mi havas dek kaj... jarojn. Tuj oni demandas: Kie? Kiel sekurigite?

Sed reen al la vortbuĉoj, ili, kiel ni lernis, necesas, kaj endas aldone tute ne allasi novajn vortojn, ĉar ankaŭ tiusfere la neologisma diablo ĉekolome vin kaptus. Almenaŭ ni tre draste reguligu la naskojn, estus ja kuniklokrimo - vi scias, kion mi opinias...

Kiel senpripense oni agas en la tiel nomataj naturaj lingvoj! En ĉiuj popoltavoloj, en ĉiuj medioj, oni uzas aliajn vortojn por la sama afero. Se sinjoro Ergoto por ekzemplo eniras liton kun iu dubinda Dulcinea, li devas diri aĉe pri fiko ktp, se li eniras ĝin kune kun intelektulino, li devas diri milon da vortoj pri io, kio en la sciencoj nomiĝas koito. Vera skandalo! Kial la homoj tiom komplikas?

Sed ni trankviliĝu, almenaŭ en Esperantio stelo nin kondukos. Don Ergoto kun sia magra (pardonu!), malgrasa ĉevalo survojas por liberigi nin de ĉiuj lingvaj tentoj. La brava kuraĝa kavaliro, kun nova vortpuriga libro en la poŝo, elpaŝas. Nova refreŝigita fundamento atendas nin. Degenero kaj ĥaoso ne plu povos timigi nin. Sed vin gardu, amikoj, la neologismaj diabloj ne dormos. La majstroj de la infera submondo instigas ilin. Ĉu vi ankoraŭ konas la monstrojn? La malican Kaloĉaj kaj ties algehenan fraton Waringhien?

Hagen Hirte

**Mia respondo al ERGOTO DE BONAERO,  
p.28 en L! 76, ankaŭ sciindaĵo por la legantoj**

... Unu el la plej gravaj okazintaĵoj en la historio de prahomo estis do sendube la eltrovo de la fajro - eltrovo, kiu konserviĝis el pratempo en formo de fajrokulto, kaj kiu ankoraŭ nun vivas ekz. kiel eterna lampo en la roma eklezio. Oni ne miru, ke en tiu tempo la homo lernis adori la fajron kiel diaĵon, ĉar en ĝi li estis ricevinta unuafoje efikan, benalportantan kaj liberigan potencon, kiu montriĝis por li kiel vera savo kaj helpo kontraŭ la teruraĵoj de la naturo.

Pri la maniero produkti fajron en la pratempo ni scias jenon:

Oni metis du lignajn bastonetojn unu sur la alian en formo de kruco. La bastonetojn oni metis sur ŝtonsubaĵon. Je la ekstremoj de la bastonetoj estis kelkfoje hokoformaj kurbaĵoj, por fiksi la bastonetojn sur la ŝtono - tian krucon oni nomas hokokruco - kaj sur tiu ĉi kruco oni starigis rondan bastonon, adaptitan al kaveto estanta en la kruco. Poste, oni kirlturnis la rondan bastonon, aŭ per la mano aŭ per helpo de ŝnuro, ĝis kiam ekaperis fajreroj.

Kompreneble tio estis streĉa laboro, kaj tial la homo devis pripensi ne ekbruligebligi fajron tiel ofte kiel ni per niaj facile ekbruligeblaj alumetoj, sed laŭeble daŭre konservi la fajron penege ricevitan.

Pro tio oni komisiis specialajn personojn gardi la bruladon de la fajro. Kiel mi supre jam diris, tiu ĉi daŭra fajro simbolo konserviĝis ĝis hodiaŭ en la roma eklezio sub la nomo "Eterna lampo".

Tio estas memorigo pri la pratempo de la homaro. Vi trovas la saman operadon ankaŭ en la mondo antikva, en la sankta fajro de diino Vesta - nomo, kiu signifas nenion alian ol "fajrujo". Per la fajro la fajrujo fariĝis la sankta centro de la tuta homa kulturvivo.

Tiel la kruco fariĝis unu el la plej malnovaj simboloj de la homaro. Estas interese, kiel en la malnovaj hindaj vedoj (sanktaj libroj de la bramanoj) estas priskribita la naskiĝo de la fajrodio Agni, estis komprenata kiel la fajrodio Agni, latine "ignis"; la eliĝo de la unua fajrero estis lia naskiĝo. Oni estis proksimiginta facile bruleblajn materialojn, sekajn foliojn kaj fojnon, kiuj servis por rapide bruligi la fajron. Oni aldonis ankaŭ grasojn, kiel ekz. buteron, kaj tio okazigis la imagon, ke la dio de la fajro estas sanktoleito (en hebrea lingvo Mesio, en greka Kristo) kaj lia simbolo estis la kruco. Per tio vi ekkonas, ke jam en la pratempo de la homaro estis uzataj ideoj kaj simbolo, kiujn ni poste retrovas en nia kristana religio. Jesuo estas nomata la sanktoleito kaj per la krucumiĝo havas la krucon kiel simbolon, tion ni trovas jam jarmilojn antaŭ li ĉe la fajrodio de la prapopoloj; kaj plue estas fakto, ke la kristana eklezio trovis la krucon jam ĉe multaj popoloj kiel tombosignon. Certe ankaŭ la esprimo "Mesio", la sanktoleito, signifanta lumalportanton, kondukanton al perfekteco, devenas de la pratempo kaj estas poste akceptita ankaŭ de Jesuo.

La kultoj, kiujn oni kulturis en la pratempo de la homaro, havis la signifon, ke per ili oni intencis daŭre fiksi grandajn veraĵojn kaj la plej gravajn eltrovaĵojn kaj elpenaĵojn de la homaro; kaj oni ankoraŭ ne havis sciencon nek skriban tradicion kiel ni, oni uzis solenajn simbolajn ceremoniojn, por konservi tiujn grandajn veraĵojn al la posteularo, kaj tiel fariĝis la religiaj kultoj.

Tio valoras ankoraŭ hodiaŭ por la kulto de la kristana kaj hebrea religioj. Tiel la ŝtono, sur kiu oni ekbruligis fajron, fariĝis oferŝtono. En la sanskrito la vorto "pramantha" signifas fajrokirtilo. Tio estas la sama radiko, kiun ni retrovas en la greka Prometeo. Vi scias, ke laŭ greka mito Prometeo forŝtelis de la dioj la fajron, kaj kiel estas laŭvorte skribite en la antikvaj tekstoj, oni krucumis lin pro la ŝtelo. Do, eĉ jam en la pratempo ne estis sendanĝere, esti lumalportanto de la homaro.

La heroo de la greka mito havis tian saman sorton, kian poste havis Kristo kaj la aliaj eminentaj homoj, kiuj batalis por vero kaj progreso; li estis turmentegata kaj krucumata de la reganta malprogresema roto da reakciuloj...

(Tiu ĉi artikolo estis elprenita el malnova broŝureto. Kompreneble, tiu ĉi skribaĵo estas originala teksto el la libro **Pri varmokulturo** (per varmo al sano) - el la 1913a jaro, ĉe la eldonistejo Ader kaj Borel en Dresden, hodiaŭ Orienta Demokratia Respubliko Germanio).

**Gert HEINTZE**

## PRI N° 76

La artikoloj de ERGOTO estas ĉiam interesaj kaj foje mirigaj. Li kompilis fragmentojn de nekonata instruo de Petro Uspensko por ke verŝajne ties fariĝu konata!

Psikologoj estas kutime prudentaj kiam ili esprimas rimarkojn. Neniu scias ion ajn pri eventuala senmorteco; ĉiuj estaĵoj estas similaj ekde la morto.

Oni pensas nun, ke korpaj elektronoj, liberigitaj ekde la morto, havas eternan ekziston. Kun plej granda prudento, nuntempaj psikologoj metas demandon: ĉu tiuj elektronoj ĝuus (propran) memoraĵon?

**Edgard Jamart**

■■■■■■■■■■ ■■ ■■■■■ ■■■■■■■■  
UNIVERSALA aŭ TRIBA KULTURO  
PLEDO POR SENNACIISMO

Mi bedaŭras, ke pro mia translokiĝo al insulo Maŭricio, mi ricevas "Laŭte" de Septembro-Oktobro nur meze de Marto. Tial mi ne havis okazon malkovri antaŭe la rebatojn de Oksana kaj Jakelino.

Verdire mi konfesas, ke mi ne pensis pri Galicia kaj aliaj najbaraj popoloj, kiam mi verkis mian artikolon "Kie estas la absurdaĵoj?" en L! 72. Kompreneble mi sciis pri tiuj popoloj, ĉar estas ĝuste pro similaj popoloj, kiuj ne interkompreniĝis, ke Zamenhof kreis Esperanton. Mi sciis, sed ne spertis, ĉar mi neniam iris en tiuj regionoj. Tio estas la kaŭzo de mia eraro denunciata de Oksana, kiu, venante de tiu regiono, estas multe pli sentema ol mi al tiu problemo, verdire ne konata en Francio kaj aliaj regionoj.

Por mi la ekvivalento de naciisto estas patrioto kaj ne ŝovinisto, kiu signifas "fanatika patrioto aŭ naciisto". Mi ne estas tiel malklera kiel vi supozas. Mi bone scias, ke vi ne estas naciista sed etnista aŭ etnaciista. Naciisto parolas

pri nacio kaj vi reliefigas kaj troigas tribajn diferencojn.

Oksana estas sentimenta, estas karaktero ŝia. Ŝi alvenis verŝajne el Galicio en Francion antaŭ ne tre longa tempo, kaj ŝi estas ankoraŭ tre ligita al sia devena lando. Tio estas tute natura, almenaŭ laŭ la temperamento de Oksana, ĉar ĝi povus esti pli kosmopolitema kaj iom forgesi la pasinton. Sed ŝiaj filoj, nepoj, ktp, ĉu ili havos la saman amligitecon? Verŝajne ne. Ŝi teneriĝas aŭdante diskon en malnova ukraina lingvo, kiun ŝi povas kompreni, bone. Ŝia tuta bofamilio ne komprenas kaj poste...? En Eŭropo ni aŭdas ĉiutage diskojn en angla lingvo, kiun almenaŭ 80% el ni tute ne kapablas kompreni, sed tamen multaj ĝuas la ariojn viglajn, gajajn, ktp. Do ni ne plue diskutu pri sentimentoj, kiuj estas individuaj.

Nun pri kulturo, pli precize kulturoj, ĉar ni scias, ke ĝenerala vorto kulturo povas esti dividata en diversajn branĉojn. Oni parolas komune pri beletra, scienca, arta, ekonomia, politika, kinematografia, ktp, kulturoj. Same oni parolas pri franca, eŭropa, ĉina, hinda, aziaj kulturoj. Kial ne pri korsika, bretona, liĥnŝtejna, ktp... naciaj kaj etnaj kulturoj? Ŝajnas, ke en tiu kazo oni ligas kulturon al lingvo. Unue, sciencoj, artoj kiel pentrarto, muziko kaj ceteraj, ne estas ligitaj al iu ajn lingvo, ili estas tuj kompreneblaj de la kompetentuloj. Kompreneble, beletro kaj drama arto estas pli ligitaj al lingvo. Sed laŭ mia vidpunkto, lingvo estas nur ilo, ne la plej grava en la kulturo. Homero, Ŝekspiro, Dante, Goethe, ktp, verkus **samajn ĉefverkojn** en Esperanto kiel ili verkis en siaj **respektivaj lingvoj**. Ne estas la lingvo, sed la talento, kiu kreas la **ĉefverkojn**, la pruvo estas, ke ekzistas ĉefverkoj en ĉiuj verkoj, eĉ se ĉiu el ni ne konas ilin. Nur la uzo de komuna lingvo permesus al ĉiuj egale ĝui ĉefverkojn. Kompreneble geniulo estas influata de sia tempo kaj medio kaj reagis laŭ propra temperamento, ktp. Poeto, kiu vivas en la grandaj ebenaĵoj, herbejoj aŭ arbaroj el Siberio, ne verkos samajn poemojn kiel poeto, kiu vivas sub la kokosarboj de Pacifiko, aŭ en la ĝangalo de Hindio, eĉ se ili uzus la saman lingvon. Konsekvence, la bunteco de la mondo, de la literaturo, ne malaperos pro ununura lingvo por ĉiuj. Eĉ en nacia lingvo du aŭtoroj ne traktas same la saman temon.

Inter la strangaĵoj, kiuj fontas el la plumo de Jakelino oni povas legi (L! n°73, p.7a) : "Lingvo ne estas nur ilo por komuniki mian penson, sed ilo por pensi." Ĉiu bona esperantisto, aŭ ĉiu persono, kiu scipovas du aŭ pli da lingvoj, kapablas pensi spontane en la diversaj lingvoj, kiujn li konas, li parolu aŭ ne

la lingvojn. Kiam li diskutas, kompreneble, Jakelino ne pensas franclingve por respondi al germana kunparolanto. Sed por tiuj, kiuj ne ofte, aŭ ne kapablas paroli la fremdan lingvon, sufiĉas ke ili legu flue libron aŭ gazeton por ke ili pensu poste en la sama lingvo, same kiam ili redaktas. Tio valoras por iu ajn lingvo : Esperanto, angla, germana, rusa, ktp... Ĉu Jakelino skribis la antaŭan frazon sen pripensi? Verŝajne ne, sed ŝi estis blindigita de siaj antaŭjuĝoj favoraj al naciaj aŭ tribaj lingvoj.

Ni devas ĉiam pensi racie, Lanti kaj Glodino pensis racie kiam ili diris : se iam Esperanto fariĝos komuna lingvo por ĉiuj, tiam post mallonga tempo (100 jaroj, eble pli-malpli) la neglekto de la plejmulto faros ke la naciaj lingvoj iom post iom formalaperos kaj fariĝos la afero de specialistoj. Oksana ne volas koni pri Usono kaj Aŭstralio, sed ekzistas, mi iris tien. Provu demandi pri via vojo franclingve aŭ germanlingve, eĉ se vi renkontus hazarde iun Dupont aŭ Schmidt!

Fakte oni ne devas forgesi, ke studi lingvon estas granda laboro. Necesas asimili almenaŭ 10000 vortojn por scipovi lingvon. Kaj kun la progresoj de la fakoj necesas pli kaj pli lerni kaj studi multajn temojn kaj fakojn. Do lerni plurajn lingvojn (2, 3, 5... 10 lingvojn) postulas multe da tempo kaj da streboj. Kiam vi scipovas diri unu vorton, ekzemple : suno, en 2, 3 ...n lingvoj, vi nenion plie konas pri fiziko de la suno. Botanikistoj uzas latinajn nomojn, por eviti lerni kaj memori plantnomojn en centoj da lingvoj.

Aliparte, nun estas sufiĉe multe da homoj, kiuj scipovas lingvojn kiaj greka, latina, aramea, sanskrita, palia, ktp... Nenio malhelpas, ke estonte estus homoj, kiuj scipovus lingvojn ne plu uzatajn ĉiutage.

Resume mi ne volas entrepreni senfinan polemikon pri tiu temo, simple mi deziris montri, ke la uzado de Esperanto ne malpermesos la kreadon de literaturaj ĉefverkoj, nek kondamnos al unuforma grizeco aŭ senkoloro. Kulturo ne estas minacata de sennaciismo. Tio, kio estis demonstranda.

**J. DEKER**

## IOMETE PRI RELIGIO

Samideano Raymond Laval, kiu famigis la plumnomon VALO, skribas (L!75, p.52-55, en lasta paragrafo de sia artikolo "Iom pri Teologio") : "Min koncerne, mi estas jam tro maljuna, tro sklerozita, tro mense rigidiĝinta por adaptiĝi al tiu evoluo..."

Ne! Tute ne! K-do VALO, korpe, estas preskaŭ 90-jara; sed intelekto, juna. Sufiĉas por ĉi tion pruvi legi la artikolojn, kiujn li aperigas sur la paĝoj de ĉi tiu "kultura informilo kaj esprimilo esperantista". Gratulojn al vi, do, maljunulo juna kaj duobla kolego! (Mi skribas "duobla" kolego, ĉar ankaŭ mi estas maljuna kaj verkas). Sed la supre menciita artikolo de VALO inspiris min por skribi iomete pri religio; kaj jen ĝi.

El ĉiuj kristanaj sektoj la plej influa kaj multnombra estas, nedubeble, la rom-katolika. Ĝia estro, nomata "papo", loĝas en urbo "Vatikano", sendependa ŝtato troviĝanta sur la itala teritorio. La rom-katolika sekto praktikas iun strangan politeismon. Ili kultas pli ol 2000 gesanktulojn, kiuj estas reproduktataj aŭ skulpte aŭ pentre. Unu el tiuj sanktuloj estas protektanto de aŭtomobilistoj; alia de tajloroj; tria de advokatoj k.c. Iu sanktulino protektas kudristinojn; alia dommastrinojn, k.c. Tamen la plej stranga fenomeno de ĉi tiu religi-movado estas la kulto, kiun ili havas por Maria, la Di-patrino, vulgare nomata Sankta Virgulino. Ankaŭ ŝi estas abunde reproduktata aŭ skulpte aŭ pentre. Kaj ŝi konkurencas venke en la adorado de la rom-katolikaj gepiuloj kun tiu de sia filo Jesuo.

Ŝi estas iu vera diino kultata ĉie. En Afriko ŝi estas reproduktita (aŭ skulpte, aŭ pentre) kun nigrulaj trajtoj; en Japanio, ŝi montriĝas kvazaŭ japanino. Sed ankoraŭ pli pri la patrino de Jesuo. Ĉirkaŭ la mezo de ĉi tiu jarcento iu "papo", kies monda nomo estis Eŭgenio Pacelli (poste papo Pio la XII-a) pere de buleo proklamis "urbi et orbi" (al la urbo - Romo - kaj al la mondo), ke la Virgulino "supreniris al la ĉielo en spirito kaj karno".

Kaj mi min demandas : kion faros Maria tie, en la ĉielo (kie troviĝas ĉi tiu ĉielo?) kun la intestoj, veziko k.c.? Mi ne povas kompreni kiel homo, kiu faris profundajn studojn, vojaĝis, pritraktis aliajn homojn, povis subskribi kaj igi publika tian malraciaĵon. Kaj tio dirita pri la kultado al la Di-patrino, al Maria, memorigas al mi, ke antaŭ pli ol 2000 jaroj kaj ĝis la 5-a aŭ 6-a jarcento de nia erao ekzistis en Efeso (Azio) famega templo, kiu estis iam unu el la sep mirindaĵoj de la mondo. En ĝi estis kultata, adorata, incensata de fanatika pastraro kaj piularo iu diino nomata Diana (de la romianoj) kaj Artemisa (de la grekoj). Ŝi estis fama en la tuta antikva mondo. Ŝia skulptaĵo, videbla en tiu templo, montris virinon kun 6 mamoj (3 je ĉiu flanko de la brusto). Tiu skulptaĵo "falas el la ĉielo ĵetita per la propraj manoj de Jupitero (laŭ grekoj Zeŭso)

- unu el iliaj ĉefaj dioj - por protekti la homojn". Ĉi tio estis aplombe predikata de la pastraro. Se vi, ge-Laŭtuloj, havas ĉe vi **Biblion**, la protestantan version, legu en "La Nova Testamento" la libron "La Agoj de la Apostoloj", ĉap. 19-an ekde la 23-a verseto kaj vi konstatos, ke la kulto al la Sankta Virgulino kaj la kulto al Diana (aŭ Artemisa) de Efeso, similas. Tio signifas, ke pasis jarcentoj, pasis jarmiloj; sed ni, homoj, daŭras same stultaj.

Kaj mi finas ĉi tiun artikoleon demandante : Ĉu Jesuo, alnomata Kristo, vere ekzistis el karno kaj ostoj? La vera fondinto de kristanismo estis iu israelido, kies nomo estis Saŭlo, poste alnomata Paŭlo aŭ Sankta Paŭlo (2 a.K. - 66 p.K.). Li neniam konis persone Jesuon. Li komencis prediki Jesuon. Li komencis prediki Jesuon post vizio, kiun li havis, kiam li estis proksimume 25-jara.

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

A. Lopez Luna

\*\*\*\*\*

## En la Laŭtejo alvenis ...

\*\*\*\*\*

\* **la unua numero de la Bulteno de ATEO** (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo). Red.: Ralph Dumain, 1629 Columbia Rd, N.W., Apt 615, WASHINGTON, DC 20009, Usono.

ATEO celas : kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn ; disvastigi esperanton inter ateistoj ; defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn E-grupojn ; instigi ĉe E-grupoj, ke oni egale varbu por Esp-o ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj ; akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esp-o mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturen nivelon de Esperantujo ; libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn sociajn problemojn.

Tiu unue n-ro klarigas la motivojn de starigo de ATEO, pravigas la elekton de la terminoj ateo/ateismo, substrekas ke ĝi permesos la liberan esprimadon de opinioj escepte de la apologiado de religio. (Ĝi do sin turnas kiel supezeble nur al konvinkitoj kaj alportos al ili nur materialon por plifortigi ilian konvinkon pri praveco de ateismo, noto de Kribo). Aldone, resendenda demando.

Interesatoj sin turnu al la komence menciita adreso.

\* **"Une langue pour tous : l'Espéranto / Unu lingvo por ĉiuj: Esperanto"** : jen bela, ilustrita broŝuro dulingva (fr. kaj esp.) eldonita de la grupo "Fresnes-Antony" de la franca Anarkista Federacio en ĝia jam



ampleksa broŝura serio : "Volonté Anarchiste". La aŭtoro estas E. Vivancos, nia laŭtulo en Kanado, kaj la enhavo estas aparte trafe uzenda en liberecana medio. Ĝi skizas historion de Esp-o kaj ties strukturon, priskribas la E-movadon kun aparta substreko pri la celaro de SAT, la personeco de Lanti, kaj - kompreneble - la rilato inter Esperanto kaj la anarkiista movado. Sume 60 paĝoj. Mendi al : A.S.H., 34 rue Jean Moulin, F 92160 ANTONY. Menciita prezo: 20FF.

#### \* jena komuniko de la Plenum-Komitato de SAT :

La Asocio K.E.K. (Kolektivo Esperantista Komunista) organizas konferencon en Aŭstrio de la 16-a ĝis la 20-a de septembro 1988. La oficiala invito tekstas jene :

**"Kolektivo Esperantista Komunista... Senpera daŭriganto de SAT, klasbatala Sennacieca Asocio Tutmonda (Prago 1921) kaj IPE - Internacio de Proleta Esperantistaro (Berlin 1932)".**

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 av. Gambetta, F-75020 PARIS, deziras sciigi al la esperantistaro, ke ĝi havas neniun respondecon en la organizado de tiu konferenco kaj protestas kontraŭ la uzurpado de ĝia nomo.

La Plenum-Komitato de SAT.

\* **"Esperanto simple"** : bonega varbbroŝuro por italoj, eldonita de TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio). Ĝi enhavas la gramatikajn regulojn kun ekzemploj kaj ekzercoj, vortareton Esp/italan kaj adresojn de porvegetaranaj restoracioj en Italio. La prezo ne estas indikita, sed la akiro estas nepre konsilinda. Tiucele skribu al la landa perantino de TEVA en Italio: Lilia Fabretto, Str. Pietro Cantoni, 12/12, I-00152 ITALIO.

#### \* la 3a n-ro de La letero de l'Akademio de Esperanto :

Vidu L! 76 p. 69. Jen ekstrakto el la ĉiam interesa rubriko "Demandoj kaj respondoj", kiu traktas temon aluditan sur p.21 de la nuna n-ro de Laŭte!

"La informilo memorigas la Fundamentan uzadon de de ("Ĝi estas amata de ĉiuj"; la kanto de la birdoj...) Estus kontraŭ la Fundamento ne uzi de en tiuj kaj tiaj frazoj. Sed konsiderante, ke klareco estas supera sed ne preskribita leĝo de nia lingvo, la Akademio allasis, ke en pli kompleksaj frazoj oni rajtas uzi alian aŭ aliajn rimedojn: ĝi allasis por tia uzado la esprimon: fare de. La Akademio nek rekomendis, nek kondamnis la formon far. Mi, ne oficiale, povas diri, ke la granda plimulto de Akademianoj malkonsilis la elizian formon "far" de" dum tre forta grupo favoris far. (Sed ĝi ne estis sufiĉa por atingi la 2/3 de la voĉoj, kiel laŭstatute necesis en ĉi tiu kazo). Preter tio estas la privilegio de kiu ajn verkisto kaj aŭtoro provi uzon de neoficialaj elementoj "je siaj riskoj kaj danĝero", laŭ la formulo de unu el miaj famaj antaŭuloj, Rektoro BOIRAC.

A.A."

\* **jena anonceto** : "Serĉas uzitajn poŝtmarkojn de la tuta mondo por helpi malliberulojn. Jesuo Perez, PK. 280, E-11300 LA LINEA (Cadiz), Hispanio.

\* **anonco pri la naskiĝo de EUROKKA : Esperanta-Rok Asocio**  
EUROKKA zorgas pri la administrado de lokaloj por trejnado de rokaj grupoj (nuntempe estas 15 lokaj rok-grupoj). Ĝi celas promocii Esperanton por diskonigi ĝin ĉe la Rokaj grupoj kaj la gejunuloj, per la Esperanta-Rok Muziko. Kiamaniere volas EUROKKA promocii Esperanton kaj la grupojn kiuj kantas en Esp-o?

- informante per afiŝoj, glumarkoj, gluetikedoj, disdonado de broŝuroj kaj informfolioj, ktp.

- organizante Esperantajn Rok-konzertojn kaj turneojn.

- elsendante Esperantajn programojn de loka Rok-radiostacio.

- organizante E-kursojn aŭ staĝojn speciale por Rok-gekantantoj kaj gemuzikistoj.

- informante regule la lokajn gazetojn kaj radiostaciojn pri Esp-o kaj la Esp. Rok-grupoj.

NI ALVOKAS ĈIUJN ESPERANTAJN ROK-GRUPOJN, KIUJ KANTAS EN ESP-O. Skribu al ni kaj sendu materialon pri via grupo (kasedoj, diskoj, dosieroj, fotoj), por ke ni diskonigu kaj promociu vin.

Nia Esp-programo komenciĝos la 30a de aprilo en Radio FMR en Tuluzo. Tiu Esperanta programo okazos ĉiun merkredon je la 14a horo ĝis 14.30 aŭ je la 12a ĝis 12.30 laŭ universala tempo, kaj ĉiun sabaton je la 9a 30 ĝis la 10a aŭ je la 7a 30 ĝis la 8a laŭ U.T. La frekvenco estas 89,1 Megahercoj. Jen la adreso, al kiu vi sendu regule informojn. Radio FMR devas vidi, ke Esp-istoj multaj ekzistas!

Radio FMR, Esperanto-Redakcio, 9 bis avenue Frédéric Estèbe  
F-31200 TOULOUSE. Tel: 61-22-64-22. Francio.

#### \* jena letero de japana samideano :

"Al vi bedaŭrinde mi devas informi, ke akcidento kiel tiu de Ĉernobil-atomcentralo okazus ĉe la Itaka-atomcentralo en Ehime-gubernio, Ŝikoku, Japanio. Por redukte reguligi elektropovon el tiu atomcentralo laŭ la konsumkvanto, ili provos eksperimenton, kiu ja estas la sama kaŭzo kiel en Ĉernobil. Se ili malsukcesas en la tre danĝera eksperimento, atompolvo alvenus al via lando, ĉar la radioaktiveco de Ĉernobil reale venis ankaŭ eĉ al Japanio, 8000 km for de la centralo. Se ili sukcesas kiel en la lasta oktobro, ili kaj aliaj elektraj kompanioj en Japanio ripetos tiujn eksperimentojn preskaŭ ĉiutage ĝis kiam eksplodos grandega akcidento.

Multaj japanoj ne scias pri la eksperimento, ĉar ili ne povas informiĝi. Nur kelkaj homoj, apelante al siaj konatoj, protestas kontraŭ la eksperimento al Ŝikoku Elektra Kompanio kaj la Itaka Atomcentralo. En kiu tago aŭ je kioma horo komenciĝos la eksperimento kiu decidus nian sorton - neniuj informiĝas krom malmultaj koncernatoj.

Do elkore mi petas vin informi viajn konatojn kaj, se vi povus, publikan organizon kiel gazeta eldonejo aŭ japana ambasadorejo.

via amiko, Kinugasa Hiroŝi."

## Novaĵoj ĉe SAT-Broŝurservo :

\* Ĵus aperis : **La Ribelo**, romano trad. el la germana fare de Tarsen Regis. 98 paĝoj, 20 FF. Pri ĝi amiko VALO verkis jenan recenzon :

Andreas Pum, bona civitano, bona soldato, modelo de obeemo kaj sindonemo, perdis kruron en milito. Li ricevis premion, ordenon, kaj permeson ludi gurdon sur stratoj. Tial li sin opinias privilegia, sin sentas feliĉa, kaj, plena de dankemo, li tute konservas sian respektagon kaj sian konfidon al ĉiuj establitaj aŭtoritatoj, al la patrio, al la registaro, al Dio... Ĝis iun tagon, hazarde alfrontita al stulta konflikto kun burĝo, kun tramoficisto, kun policano kaj kun juĝisto, li spertas, kaj fine ekkomprenas, ke li estas viktimo de la subpremanta socio. Tiam subite liaj okuloj malfermiĝas, kaj li fariĝas konscia ribelulo, aŭ, kiel li diris, "pagano".

La ŝtatinstancoj deprenas de li la gurdolicencon kaj la honorkrucon, lia edzino lin forĵetas, sekvas vico da mizeraj aventuroj, en kiuj li estas forlasita de ĉiuj, krom de unu lerta senskrupula fantaziulo, kiu strange amikiĝis al li, fidele lin helpas, kaj havigas al li kvietan vivon. Tie, frue maljuniĝinte, li finas sian malfeliĉan vivon. Li mortas meze de fantasta sonĝo, en kiu, renkontinte Dion, la eks-konformisto esprimas al la Ĉiopova sian rankoron en blasfema parolado, kulmino de tiu sanktbildorompa libro.

Libreto ja, ne dika, sed densa, sobre forta, inda je nia broŝurkolekto; libro, kiun ĉiu liberamanto devas meti sur sian breton.

La traduka lingvaĵo estas bonega, krom eble kelkaj ne tute necesaj neologismoj; ekz. p.91, l.-5 : satisfakcio\* (kontentigo) Bonega ankaŭ la presado kaj prezento.

### **Valo**

\* Ĝi tamen troviĝas en PIV, sed kun aliaj, pli striktaj signifoj.

\* Estas nun elĉerpitaj : **Imaga dialogo Marks/Bakunin** (MB) kaj **Kiel diri?** Tuj kiam eblos, estos entreprenata la reeldono de **Kiel diri?**, kiu, jarojn post sia unua eldono, plu ricevas mendojn. Dume, la interesatoj bonvolu pacienci...

\* Estas nun finita la tajpado de "**Legendo pri la bela Pekopeno kaj la bela Boldura**" (el la franca, trad. VALO), sed mi atendas pli oportunan periodon kun sufiĉa libera tempo por ofseti.

Kribo

\* De nun haveblas kiel aparta broŝuro : "**Ekologio, ĉu ideologio?**" (Wolfgang Gunther), (kodo : ĈI), 24 p., 3 FF + afranko.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2			■							
3						■				
4									■	
5					■					
6		■							■	
7							■			
8					■					
9									■	
10			■		■					
11										

## **KRUCVORTENIGMO**

### **Horizontale**

- 1.- Eliza Orzeszko, brave taksata de Zamenhof (s.f.).
- 2.- Sufikso.- Sidejo por muso silentema.
- 3.- Sur la vangoj de junuloj (s.f.).- Kaptajo (s.f.).
- 4.- Tenio vivanta en la intesto de la hundo.
- 5.- Mekanika forto (s.f.).- Rilata al kampo de agado.
- 6.- Senfreŝiĝos.
- 7.- El tia ligno, la Eternulo ordonis al Moseo fari keston, stangojn kaj tablon. (Eliro 25 - 10,13,23).- Alia mekanika forto (s.f.).
- 8.- Dua parto de titolo de fama romano fare de Dostojevski (s.f.).- Kion ĝi diras, tion Dio diras.
- 9.- Pasas tra diversaj iompostiomaj ŝanĝoj.- Esperantaj inicialoj de hungara verkisto (1902-1961), kies plumnomo estis Emba.
- 10.- Interjekcio uzata ĉe la telefono.- Elmetita al danĝero.
- 11.- Artisto, kiu kreas dekoraĵajn tutaĵojn. (s.f.)

### **Vertikale**

- 1.- Trafe maltrafe.
- 2.- 1988 estas ĝia jaro en Ĉinio.- Grandan vazon por hejmaj uzoj.
- 3.- Perfekta sereneco ĉe la Budhistoj.
- 4.- Ĝi simboliĝas per kapra korno plena de floroj, fruktoj kaj grenspikoj (s.f.).- Mallofe.
- 5.- Malinsulo.- Metu la buŝaĵon de blovinstrumento inter la lipoj.
- 6.- Sufikso.- Arbo, el kies grajnoj oni fabrikas la ĉokoladon (s.f.).
- 7.- Gusto.- Tiuj, kiujn li ensorĉas, konservas la kapon malvarma (s.f.).
- 8.- Komodero.- Kemia simbolo de metaloide, baza komponanto de la nuna elektroniko.
- 9.- Trian parton de la maldika intesto. - Ĝiaj branĉoj estas multe uzataj kiel kristnaska-festa ornamaĵo en Britio (s.f.).
- 10.- Kontraŭas la "ventron" sur vibranta kordo (s.f.).- Kolrompulo (s.f.)

### **Sfinksido**

### **Solve de L! 76.**

**Hor:** 1.ĜIRINDIKIL. 2.UTOPIO. ORA. 3.SAKET. IKOR. 4.TL. KOVRI. 5.ADZA. DPK. 6.MERKURIALO. 7.EV. URSOREL. 8.ZETA. ANONO. 9.JUNUNURA. IN. 10.RAKONT. AGI. 11.EJO. GORDIO.

**Ver:** 1.ĜUSTAMEZURE. 2.ITALDEVENAJ. 3.ROK. ZR. TUKO. 4.IPEKAKUANO. 5.NITO. UR. UNG. 6.DO. VERSARTO. 7.IR. IONA. 8.KOKIDARO. AD. 9.IRO. PLENIGI. 10.LARVKOLONIO

## Sur la kristalaj flugoj de l' imago

Se mi estus arbo,  
Kaj vi ĉiuj Laŭtuloj,  
Arbo en la sama arbaro,  
Miaj radikoj fosus la teron  
Kaj la muskojn,  
Sin enŝovus  
En la rokajn fendojn,  
Serĉus  
Tra la malklareco kaj la humaj odoroj  
Ĝis ili trovus la viajn.  
Tiam, miaj radikoj eksentus ĝojon  
Tiel vivan,  
Ke la tuta arbaro emocie murmurtremus  
Kiel post ekflugo de mil birdoj ;  
Mil birdoj, kiuj vojaĝus  
Tra la tuta mondo,  
Por instigi la homojn planti  
La semojn de la frateco, de la divido,  
de la harmonio kaj de la paco...

Michèle Freud

\*\*\*\*\*

**R.A. :**

**Y A N N E**

*Sonorilo aŭdiĝas*

*Manĝotempon indikas.*

*Infanoj malsataj, bruantaj*

*Ekscitiĝas.*

*Kelkaj plurestas*

*Babilante,*

*Aliaj forkuras.*

*Yanne leviĝas,*

*Al tabulo sin direktas*

*Kaj skribas senhezite*

*Per dikaj literoj*

*Frazon plej kortuŝan :*

*"Mi amas komputadon*

*Kaj mian instruiston".*